# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

Jaro I. — Suplemento de «Kataluna Esperantisto» — Junio 1912. — Nro 1

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88 · Redaktoro : JOZEFO GRAU

Barcelono vivu, kresku kaj floru. — L. L. Zamenhof

ENHAVO *Saluton!* La Komitato. — *Nia programo*, Jozefo Grau. — *Teo dum dancado*, Raportisto.

## SALUTON!

«Barcelona Stelo» honoriĝas salutante sincere per tiu ĉi unua numero de sia Bulteno ĉiujn grupojn esperantistajn, al kiuj ĝi deziras longan kaj fruktodonan vivadon. Aukaŭ per ĝi, «Barcelona Stelo» esprimas sian sinceran dankon al «Centro de Unión Republicana del Distrito VII» kiu tiel afable kaj helpeme ĝin gastigas.

La Komitato

## NIA PROGRAMO

Ĝi estas mallonga. Ni intencas, unue, sciigi per tiu ĉi hodiaŭ aperanta Bulteno ĉiujn niajn gegrupanojn pri ĉiaj aferoj rilataj je la Grupo. Due, ni deziras kunrilatiĝi per ĝi pli intensive kaj frate kun la esperantistaj grupoj, por ke ilia helpo estu donata al ni en niaj komunaj entreprenoj, ĉar ni esperas, ke de nun — post la elmontroj amikecaj okazintaj inter ni, post la de ĉiuj sentata bezono pligravigi en unuiĝon, nian tutan organizaĵon, — la grupoj barcelonaj, laborintaj dise ĝis la unua momento, devas interhelpe sin proksimigi por atingi la kompletan esperantigon de nia progresema lando.

Jen estas nia celo, kiu sendube meritos de niaj gesamideanoj ilian estimon. Kaj dirante *nia*, ni ja ne volas signifi, ke ĝi apartenas nur al la membroj de «B. S.», sed ke ĝi estas la celo de ĉiuj esperantistoj, niaj kolegoj kaj amikoj.

*Reciprokece, «Barcelona Stelo» metiĝas ĉiel de nun je la dispono de ĉiuj amikoj de Esperanto.*

Kaj ĉar per tiu antaŭparolo, esprimo de la deziroj de «B. S.», mi plenumis la ordonon de l' modo, kiu devigas, ĉe ĉia komencataĵo, difini ĝiajn celon kaj proponojn, mi diros kelke da dankaj vortoj pro la nemeritita honoro, kiun faris al mi miaj kungrupanoj, elektante min kiel redaktoron de tiu ĉi Bulteno. Akceptu do, karaj geamikoj, mian koran dankon; kaj antaŭpardonu miajn erarojn, se malfeliĉe en ilin mi falus.

Jozefo Grau

TEO DUM DANCADO DEDIĈITA DE «LA RONDO» AL «BARCELONA STELO».

La 9an de Majo okazis en la sidejo de «La Rondo» vesperfesto, kiun ĝi dediĉis al nia grupo.

Aromo de bukedoj, donacitaj ĉe la eniro al la ĉarmaj invititinoj, bonodorigis la aeron de la salono, en kiu flosis ia alloga spirito de interfratiĝo; ĉe la scenejo, kiun flanke ornamis la standardoj de ambaŭ grupoj, prezidis la feston busto de Dro. Zamenhof.

Ridoj gajaj kaj brua interbabilado plenigis per harmonio la festejon. Subite oni muzikis kaj je la sonoraj taktoj de la esperantista «Rondo» amaso da geaj paroj ekdancis la simbolan dancon, kiu devis esti bisata. Valsoj kaj aliaj dancoj estis ludataj unu post alia, kaj la gejunularo dance amuziĝis.

En la mezfesta ripozo, oni sidiĝis apud la tabloj kaj dum tetrinkado Sro. Campdelacreu, prezidanto de la regalanta grupo, alparolis la alestantojn, konstatante ke la festo, kiun la de li prezidata grupo dediĉis al «Barcelona Stelo» estas prezidata fakte, ne de li, sed de nia Majstro, kiu estas la sola supera al la samgrade rajtaj ĉeestantoj.

Sro. Rey, nia prezidanto, dankis tre sincere la afablecon de «La Rondo», kiu tiel alte levis sian frateman spiriton per tiu amika festo. Kaj post aludo al kelkaj el la grupanoj alestantaj, li sciigis ŝerceme ke ŝanĝe de *teo* dum *dancado*, «B. S.» regalos «La Rondon» per *kafo* dum *kantado*.

Sro. Pujulà, legis improviżitan versaron, kiun oni aplaŭdis.


Dro. Bremon, prezidanto de K. E. F., eldiris sian ĝojon pro la agrabla festo, kaj parolis ĝuste pri la tiel multe necesa unuigo de esperantistaj grupoj, kiu montriĝas, per faktoj tiel elokventaj kiel la okazanta festo, tute farebla.

Sro. Grau, aludis la devizon de la Kataluna Federacio, dirante ke la ĉeestantoj estas vere la *gutaro* de l' *maro* de Esperantismo kaj memorigis ĉiujn pri tio ke, por fari *grandan rondon familian,* oni devas atenti ke *konsento konstruas, malpaco detruas*. Sro. Dalmau, esprimis ankaŭ sian ĝojon pro l' festo kaj diris ke ni prave povas esperi. Ĉu mi bezonas diri ke ĉiuj parolintoj ricevis varman aplaŭdadon?

Kiel fino, Sroj. Campdelacreu kaj Rey tostis por la prospero de la grupoj, kiujn ili prezidas, kaj la unua je la nomo de «La Rondo» donacis la bukedegon, kiu ornamis la prezidejon, al la plej malnova anino de «B. S.», la simpatia fraŭlino Rey.

Tiam oni pozis antaŭ la fotografmaŝino kaj post la *fulmoj* nepraj, oni sin donis denove al dancado, kiu daŭris ĝis la 1.a post noktomezo. La majestaj sonoj de «La Espero» ĥore kantata de ni ĉiuj finis tiun belegan neforgeseblan feston. Karaj kolegoj el «La Rondo», gratulojn kaj dankon!

RAPORTISTO




La leporo (mandesegnaĵo) 1502. (Vieno.)

ALBRECHT DUERER. Lia vivo kaj elekto el liaj verkoj. Kun klarigoj de la apartaj folioj. Je komisio de la „Instruista unuiĝo por artedukado, Nürnberg" eldonita de Dro FRIEDRICH NUECHTER. Esperantigita de la Germana Esperanto Asocio (G. E. A.) Kun 53 bildoj ĉe la teksto kaj 1 kolorpresaĵo. Formato 27 : 35 cm. Prezoj: 2 Sm broŝurita, 2,500 Sm tole bindita. Aĉetebla ĉe la eldonejo: Librejo Fr. Seybold, Ansbach (Bavarujo) ankaŭ ĉe la Administracio de la „Kataluna Esperantisto" en Sabadell (Hispanujo).




La maljuna viro de Antverpeno (mandesegnaĵo) 1521. (Vieno.)

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO I. — SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO» — JULIO 1912. — N^ro^ 2

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF



## INTIMA DANKA FESTO ĈE «BARCELONA STELO»

La 20^an^ de l' lasta Junio «Barcelona Stelo» regalis la grupon «La Rondo» per Intima festo, kiun partoprenis ne nur la membroj de ambaŭ grupoj, sed ankaŭ kelkaj grupanoj de «Badalona Stelo», kiuj malgraŭ la malfacilaĵoj rekontitaj ĉe la alveturo volis honori per sia ĉeesto la feston de danko.

Je la deka vespere alvenis en la salonon la gegrupanoj de «La Rondo» kunportante sian belan standardon, kiun oni salutis per longaj aplaŭdoj. Ĉe la enirejo la ĉeestantinoj ricevis belajn bukedojn, kiuj ellasis en la aero agrablan parfumon.

La spirito de interfratiĝo flosinta en la aero de l' festo ĉe «La Rondo» fariĝis en tiu de «B. S.» realaĵo, kiu florigis en la lipoj de ĉiuj ĝojajn frazojn de amo.

Dancado komenciĝis. Multo da paroj de gedancantoj formigis la simbolan *rondon*, per kiu estis komencata la festo. Valsoj, sardanoj, k. a. estis dancataj kun entuziasmo de la belaj samideaninoj kaj de ĝentilaj verdstelanoj.

La prezidanto de «B. S.» invitis ĉiujn iri en la salonon de la kafejo, kie okazis festeneto regalanta la ĉeestantaron. Ĝi prezentis tre belan aspekton, kiun niaj legantoj povos imagi per helpo de la gravuraĵo supre enpresigita.

Sro. Rey, je la nomo de «B. S.» dediĉis la okazantan feston al la tuta grupo «La Rondo», kiu tiel frate kondutis ĉiam kun ĉiuj aliaj esperantistaroj. Tiu ĉi intima festo — li diras — estas pruvo de la danko de «Barcelona Stelo» por tiu, kiun vi okazigis en via sidejo. Volu ĝin akcepti bonvole!

Post la aplaŭdado, kiu premiis la dediĉajn frazojn de Sro. Rey, la prezidanto de «La Rondo» Sro. Campdelacreu prezentas la sincerecon de «L. R.» kaj ĝian intencon honorigi la grupojn kunagantajn; tial ĝi organizis la feston dediĉitan al «B. S.» Li diras, ke «Barcelona Stelo» kaj «La Rondo» estas laŭŝajne du grupoj, sed ĉar ili deziras sincere unuiĝon, oni povas aserti, ke ili estas unu sola rondo. Li dediĉas al «B. S.» kelkajn laŭdajn vortojn, dirante ke ĝi estas fratema kaj bonorganizita esperantistaro. Kaj li finas, dirante ke por pli bone sin defendi kontraŭ maljustaj atakoj ĉiuj devas memori ke *unuiĝo estas forto.*

Tiujn ĉi lastajn vortojn akceptis la alestantoj per bruaj aplaŭdoj.

Sro. Forcada, provinca deputito, grupano de «B. S.» prezentas al ni sian admiron je tiu junularo adoranta kulturon, kiu ankaŭ scias feste amuziĝi, kaj sian gratulon al la esperantistoj pace laborantaj. Sprite li rakontas epizodon okazintan al li en Svislando, kiu konvinkis lin tute pri la utilo de Esperanto. Fine, li proponas al ni sian helpon laŭ eble plej grandan.

Sro. Gili, sekretario de «B. S.» legas aliĝojn de Sro. Carcereny, barcelona urbkonsilanto kaj de Sro. Serrats, kiuj bedaŭras sian devigitan foreston de la festo.

Sro. Rocamora, trinkis por la triumfo de nia sankta ideo, kaj dankante Sron. Forcada, stimulis lin, ke li influu por la atingo de nia totala venko.

Sro. Dalmau, parolis pri la bezono konscii la farotaĵon por senprokraste alveni al unuiĝo, kaj incitis ĉiujn kuraĝe laboradi. Li tostis por Dro. Zamenhof, Esperanto kaj plifortigo de nia nuna organizo.

Sro. Pujulá bedaŭris la foreston de Dro. Bremón kiu, se malsano ne retenus lin for, estus povinta paroli en la nomo de K. E. F. Li komencis sian belan paroladon, elmontrante sian ĝojon pro la reciproka festado, kaj konsiderante farebla la unugrupiĝon de la frate laborantaj barcelonaj samideanoj. Sin turnante al Sro. Forcada, alparolis al li pri tio, ke la reprezentantoj de la popolo, de tiu popolo kiu ĉiutage pli entuziasme akceptas la helpan lingvon, estas ĝuste kiuj povos kaj devas oficialigi Esperanton. Por pruvi tion li elvolvis kleran rezonadon pri movado filologia kaj interna ideo de Esperantismo, kiu gajnigis al li ovacion. Li devis ree stariĝi kaj reparoli, dirante ke tiujn aplaŭdojn oni devas dediĉi nur al la Majstro.

*(Daŭrigota)* RAPORTISTO

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO I. — SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO». — Nro 3

Aŭgusto Septembro 1912

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Intima Danka Festo ĉe «Barcelona Stelo»*, Raportisto. — *Projekto de unugrupiĝo*, Pacemulo. — *Kondolenco*, Jozefo Grau.

## INTIMA DANKA FESTO ĈE «BARCELONA STELO» [1]

*(Daŭrigo)*

Sro. Grau, en la nomo de «Barcelona Stelo» dankis la grupanojn de «La Rondo», kiuj bonvolis honori nin akceptante nian inviton; sinjorojn Forcada kaj Carcereny por iliaj laŭdaj kaj kuraĝigaj frazoj; sron. Pujulá, kiu tiel ĝuste esprimis la dezirojn de la esperantistoj; la fraŭlinojn ĉeestantajn, kiuj estis la plej bela ornamo de la festo, la anojn de «Badalona Stelo» kaj la societon «Centro de Unión Republicana del VII Distrito», kiu sindone helpas la disvastigon de Esperanto. Li finis per la vortoj : «Al vi ĉiuj en unu frata ĉirkaŭpreno la esprimon de nia amo», kiujn li sendis al ĉiuj ĉeestantoj kaj kiujn oni aplaŭdis entuziasme.

Tiam, la prezidanto de «B. S.» donacis la bukedon ornamintan la prezidan lokon al simpatia fraŭlino Campdelacreu, kiu estas la plej malnova anino de «La Rondo».

Oni reiris en la dancosalonon, kie la dancado daŭris ĝis la dua matene. Ĝin oni finis per kantado de «La Espero», kiu inde kronis la tre belan feston partoprenitan de 150 gesamideanoj, kiuj sendube longe konservos bonrememoron pri ĝi.

RAPORTISTO

★ ★ ★

1) Vidu numeron 2 de la BULTENO DE «B. S.»

## PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

### POR LA BARCELONAJ ESPERANTISTAJ GRUPOJ

La 27an de Julio en la sidejo de «La Rondo» interŝanĝis opiniojn pri projekto de unuiĝo de la esperantistaj barcelonaj grupoj, kiun verkis Sro. Jozefo Grau laŭ komisio de la «Barcelona Stelo», Sroj. Campdelacreu, Igual, Aguiló, Molgosa, Cervera, Montserrat kaj Estrems el «La Rondo», Soler, Rovira kaj Badia el «Ĉiam Antaŭen», Rey, Gili, Navas, Pérez kaj Grau el «Barcelona Stelo»

Sro. Grau elvolvis sian detalan projekton, kiu malgraŭ kelkaj malgrandaj rimarkoj meritis la aprobon de la ĉeestantoj. Tial ili elektis komisionon konsistantan el Sroj. Soler, Campdelacreu, Rey, Igual, Gili kaj Boyé, kiun prezidos Sro. Rocamora kaj helpos Sro. Grau.

Tiu komisiono elstudos la tutan projekton kaj, redaktinte laŭ la eblaj interkonsentoj provizoran regularon, invitos ĉiujn barcelonajn grupojn delegi du reprezentantojn, kiuj, esplorinte la provizoran projekton, proponos la modifojn, kiujn ili opinios necesaj por starigi «Barcelonan Esperantistan Societon» kunigontan por komuna agado la grupojn, kiuj akceptis la definitive interkonsentitan regularon.

Ni esperas, ke la grupoj barcelonaj volos interesiĝi je tiu grava afero; kaj ĉar iliaj reprezentantoj povos labori super realaĵo — la projekto provizora de la Komisiono, kiu akceptos ĉiujn necesajn ŝanĝojn — kaj ne super abstraktaĵo — deziroj kaj intencoj ne enkorpiĝintaj en materiaĵon — ni antaŭvidas sukceson por la kuraĝa entrepreno.

PACEMULO.

★ ★ ★

## KONDOLENCO

Nia kara prezidanto, Sro. Stefano Rey, havis la malĝojon perdi sian malgrandan filineton Herminia, kiu mortis la 1an de Aŭgusto.

Al la geedzoj Rey kaj al ilia filino nia kungrupanino Fino. Mercé mi esprimas en la nomo de «Barcelona Stelo» ĝian sinceran kondolencon por la perdo de ilia filino kaj fratino.

JOZEFO GRAU.

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO I.—SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».—Oktobro 1912.—Nro 4

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88 · Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Jozefo Grau. — *Adresaro de «Barcelona Stelo»*.

## GRUPAJ AFEROJ

*Projekto de unugrupiĝo.* La elektita Komisiono komencis laboradi super la regularo provizora kaj formulis jam 10 ĉefajn regulojn interkonsente akceptitajn. Oni akcelos la verkadon de la projekto bazo, por ke la unugrupiĝo povu plenvive efektiviĝi la 1.a de la venonta Januaro. La simpatio, kun kiu estis ĉie akceptata la ideo, kredigas pri la sukceso de la entrepreno.

*Standardo por la K. E. F.* Ni invitas ĉiujn niajn amikojn kaj gegrupanojn partopreni en la monkolekto, kiun oni malfermis ĉe la Kongreso en Terrassa por akiri standardon por la *Kataluna Esperantista Federacio.*

La Komitato de «Barcelona Stelo» esperas ke niaj kunsocietanoj konservos alte staranta la nomon de nia grupo, gravigante la monkolekton per malavaraj donacoj.

(La donacojn ricevas nia sekretario Sro. Gili.)

*Bonvenon!* Estas reveninta inter nin el Francujo nia senlaca samideano Sro. J. Delclós. Estu bonveninta!

*Bedaŭro.* En la nomo de la fraŭlinoj aninoj de «B. S.» mi esprimas kun malĝojo ilian bedaŭron pro tio, ke netute ĝentile grupo esperantista antaŭanoncis la partoprenon, en ekskurso, de multnombraj fraŭlinoj.

JOZEFO GRAU

* * *

ADRESARO DE «BARCELONA STELO», LA $1^{an}$ DE JULIO 1912

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | Sro. | E. Rey | Prezidanto | strato | Margarit, 64, $1^r$ - $1^a$ |
| 2 | » | J. Grau Casas | Vicprezidanto | » | Clarís, 72. |
| 3 | » | J. Gili | Sekretario | » | Mallorca, 202, entl., $2^a$ |
| 4 | » | R. Pérez | Vicsekretario | » | Cabanyes, 15, $3^r$ - 1. |
| 5 | » | M. Pascuet | Kasisto | » | Cruz Canteros, 57. |
| 6 | » | Johano Puig | Kalkulisto | » | Aribau, 100, $4^t$ - $1^a$ |
| 7 | » | P. Navas | Bibliotekisto | » | Cruz Canteros, 12, $3^r$ - $1^a$ |
| 8 | » | J. Carcereny | Voĉdonanto | » | Rambla S. Josep, 33. |
| 9 | » | J. Insensé | » | » | Urgell, 84, $4^t$ - 2. |
| 10 | » | B. Mira | » | » | Olivo, 39, entl., $2^a$ |
| 11 | Fino. | R. Cortes | Voĉdonantino | » | Cruz Canteros, 22, $1^r$ - $1^a$ |
| 12 | » | L. Sánchez | » | » | Salvà, 45. |
| 13 | » | C. Puig | » | » | Aribau, 100, $4^t$ - $1^a$ |
| 14 | Sro. | J. Delclós | | » | Hospital, 66, entl., $2^a$ |
| 15 | Fino. | M. Rey | | » | Margarit, 64, $1^r$ - $1^a$ |
| 16 | Sro. | J. Borras | | » | Blai, 56. |
| 17 | » | J. Forcada | | » | Industria, 188. |
| 18 | » | J. Montané | | » | Ronda S. Antoni, 33. |
| 19 | » | E. Serra | | » | Rosal, 4. |
| 20 | » | Y. Bonastre | | » | Parlament, 19, $3^r$ - $1^a$ |
| 21 | » | Ll. Inglada | | » | Salvà, 20. |
| 22 | » | J. Puig | | » | Aribau, 100, $4^t$ - $1^a$ |
| 23 | » | Ll. Nicolau | | » | Tallers, 43. |
| 24 | Fino. | J. Sánchez | | » | Salvà, 45. |
| 25 | » | E. Pascual | | » | Blai, 53, $1^r$ |
| 26 | Sro. | A. Baucells | | » | Ronda S. Antoni, 51, $3^r$ - 2 |
| 27 | » | J. Espallargas | | » | Ronda S. Pau, 37, $3^a$ |
| 28 | » | A. Graell | | » | Salvà, 8, $3^r$ - $1^a$ |
| 29 | » | Rafel Sorolla | | » | Tantarantana, 4, $2^n$ |
| 30 | » | J. Serrats | | » | S. Martí, 7, $2^n$ - $4^a$ |
| 31 | » | J. Guixà | | » | Sans, 310 |
| 32 | » | C. Castells | | » | S. Martí, 7, $4^a$ |
| 33 | » | S. Montchulí | | » | Morillo, 15, $1^r$ - $1^a$ |
| 34 | » | J. Forns | | » | S. Martí, 7, $1^r$ - $4^a$ |
| 35 | » | A. Salom | | » | Diputació, 103, $2^n$ - $1^a$ |
| 36 | » | P. Guilleumot | | » | Diputació, 109. |
| 37 | » | A. Moles | | » | Diputació, 99, $5^t$ |
| 38 | Fino. | A. Leonor | | » | Guardia, 14 bis, $4^t$ - $2^a$ |
| 39 | Sro. | A. Vinyals | | » | Torrent de l'Olla, 96. |
| 40 | » | A. Nevot | | » | Blai, 44, $3^r$ - $2^a$ |
| 41 | » | R. Manaut | | » | Creu Coberta, 76. |
| 42 | » | A. Nin | | » | S. Geroni, 31. |
| 43 | » | E. Pellicer | | » | Elisabets, 3, $3^r$ - $1^a$ |

*(Daŭrigota)*

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO I.—SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».--Novembro 1912.--Nro 5

Grupa sidejo : Str. Marqués del Duero, 88 ▪ Redaktoro : JOZEFO GRAU

---

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

---

ENHAVO : *Grupaj aferoj*, Jozefo Grau.

---

## GRUPAJ AFEROJ

*Espero*. Ni ricevis la sekvantan leteron : «La Prezidanto de la «Grupo Esperantista Barcelona» havas la honoron sciigi vin pri la jena decido : La «Grupo Esperantista Barcelona» dezirante la plej grandan sukceson al nia kara lingvo kaj opiniante ke nur per unuiĝo oni povas atingi tiun celon, decidis en lasta kunveno kunfandiĝi al «ESPERO KATALUNA» la plej malnova Societo el Katalunlando. Esperante ke ni ne estos solaj en ĉi-tiu decido mi vin kore salutas. Barcelono Oktobro 1912a. — ALFONSO SABADELL.»

Ni dankas la afablecon de Sro. Alfonso Sabadell, kaj ni prave esperas, ke post la alsendo de tiu letero la unuiĝintaj grupoj «Barcelona» kaj «Espero Kataluna» ne volos plu resti solaj kaj partoprenos en la starigo de la «B. E. S.», kies projekton ellaboras kelkaj enurbaj samideanoj, kiuj post nemulte ĝin publike prezentos por ekzamena esplorado kaj perfektigo, laŭ ni diris jam per nia BULTENO.

*Titolaro de Esperantaj verkoj tradukitaj el la Rusa Literaturo*.— Ni ricevis *por recenzo* tiun interesan broŝuron. Malgraŭ nia deziro, ni ne povas fari recenzon, ĉar nia BULTENO estas ja malgranda. Ni sincere dankas la afablan sendinton.

*Abono al la Bulteno de «B. S.»* — Kelkaj eksterlandaj samideanoj afable sin turnis al ni, demandante kiamaniere oni povas aboni la Bultenon de nia grupo. Tia abono ne ekzistas ĉar la Bulteno estas suplemento de K. E. organo de la K. E. F. Tiu, kiu deziros ricevi ĝin ĉiumonate, povas aŭ aliĝi al la «K. E. F.» (Jara kotizaĵo, 1'20 spesmilojn) kiu sendos al li ĉiun numeron de K. E. kun la Bulteno, aŭ fariĝi koresponda membro de «Barcelona Stelo» (Monata kotizaĵo : 1 spescenton).

*Ekspozicio de Charleroi (Belgujo).* — La belgaj esperantistoj entreprenis la taskon pruvi al la Belga Registaro, ke Esperanto pli ol ĉiu lingvo natura taŭgas kaj faciligas ĉian aferon. Ili samideane petas de ni helpon, kaj ni konvinkitaj, ke niaj amikoj profitos la okazon elmontri sian deziron akceli laŭ siaj fortoj la progresadon de nia ideo, petas ilin volu po grande aĉeti ĉe nia grupa sidejo la biletojn de la loterio de l'Ekspozicio de Charleroi, per kio ili helpos ne nur niajn belgajn samideanojn sed ankaŭ la kason de nia grupo, kiu profitos deprenon de 10 po 100 el la venditaj de ni biletoj. Jen detaloj de tiu loterio.

## LOTERIO DE LA EKSPOZICIO DE CHARLEROI

PERMESITA DE LA BELGA REGISTARO KAJ SUBMETITA JE ĜIA SENPERA KONTROLO

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| 1 | Lotaĵo de unu miliono da | frankoj | (400,000 | sm.) |
| 1 | » » 124,000 | fr. | (49,600 | sm.) |
| 1 | » » 62,000 | fr. | (24,800 | sm.) |
| 1 | » » 31,000 | fr. | (12,400 | sm.) |
| 1 | » » 15,500 | fr. | (6,200 | sm.) |
| 10 | lotaĵoj ĉiu de 10,000 | fr. | (4,000 | sm.) |
| 25 | » » 5,000 | fr. | (2,000 | sm.) |
| 80 | » » 1,000 | fr. | (400 | sm.) |
| 150 | » (artaj verkoj) je suma valoro de 70,000 fr. | | (28,000 | sm.) |

Ĉiuj lotaĵoj estos disdonitaj kun sia plena valoro, kiu ajn estos la nombro de la biletoj venditaj ĉe la momento de la lotado. Depreno de 5 po 100 estos farita nur sur la kvin unuaj lotaĵoj; ĝi estos difinita por bonfaraj entreprenoj. Prezo de la bileto : **unu franko** (0'40 sm.)

*Grava Rusa Vortaro.* — Oni nin sciigas el S. Peterburgo ke Sro. V. Makuŝkin eldonanto de nova Rusa Vortoro publike promesis oferi 20 po 100 el neta profito por Esperanta propagando, kondiĉe ke esperantistoj iom diskonigu tiun utilan verkon. Samideanoj kiuj deziras ricevi unu aŭ multajn prospektojn pri tiu Vortaro, estas petataj sin turni al la aŭtoro : S-ro. P. Stojan, B. O. 17 lin. 68, k. 25. S.-Petersburg. Ruslando, aŭ al nia Sekretario.

*Malbedaŭro.* — Post klarigoj de la Aluditoj per la noto «Bedaŭro» de nia lasta BULTENO, mi ĝojas publikigi, ke ilia intenco tute ne estis malafabla. La malo efektive ŝajnis al mi tre stranga.

JOZEFO GRAU

# BULTENO DE "BARCELONA STELO"

JARO I.-SUPLEMENTO DE «KATALUNA ESPERANTISTO».-Decembro 1912.-Nro 6

Grupa sidejo : Str. Marquès del Duero, 88 • Redaktoro : JOZEFO GRAU

BARCELONO VIVU, KRESKU KAJ FLORU. — L. L. ZAMENHOF

ENHAVO : *Projekto de unugrupiĝo,* Jozefo Grau. — *Kondolenco.* — *Parkurbo Esperanto.* — *Adresaro de «Barcelona Stelo».*

## PROJEKTO DE UNUGRUPIĜO

La komisiono prilaboranta la projekton de unuiĝo de la barcelonaj esperantistaj grupoj kunvenos la 7.an de Decembro je la 9'30 vespere ĉe la «American Bar» str. Pelayo, por fine redakti la regularon por la unua periodo de la unuiĝo. Tuj kiam tiu regularo verkita de la komisiono estos plene akceptita de la grupoj, kiuj prenis sur sin la taskon organizi kaj starigi «Barcelonan Esperantistan Societon», ĝi estos diskonigita inter la barcelona esperantistaro.

La Komitatoj de la grupoj povos proponi tiam por esplorado ĉiujn dezirindajn ŝanĝojn en ĝi, ĉar la celo de la organizintoj estas krei spiritovastan societon, al kiu povos aliri la ekzistantaj grupoj, eĉ nenion demetante el siaj opinioj kaj deziroj.

Laŭ la esplorata projekto la unugrupiĝo fariĝos ne subite sed laŭ periodoj, dum kiuj malrapide ŝanĝiĝos la cirkonstancoj de vivado de la grupoj, kiuj akceptos kaj aliĝos al la ideo. La aŭtonoma funkciado de la distriktaj filioj, kiuj konservos sian nomon kaj propraĵojn, garantias la sukceson de la entrepreno.

Certe niaj kolegoj alportos al nia ideo sian valoran helpon, kaj tial ni ne dubas pri la baldaŭa efektiviĝo de «B. E. S.», kiu estos la bela hejmo, kie ni ĉiuj frate kunvivos la esperantan vivon.

JOZEFO GRAU

## KONDOLENCO

Al niaj samgrupaninoj, finoj. Rosa Cortès kaj Rosa Simó, kiuj ploras la morton de sia avino, «Barcelona Stelo» esprimas sian plej sinceran kondolencon. Pace ripozu la mortintino.

## PARKURBO ESPERANTO

Niaj samgrupanoj sciiĝis jam pri la granda entrepreno krei Esperantan Urbon. La Komitato de «B. S.» petis de la Propaganda Ligo Parkurbo Esperanto sufiĉan nombron da prospektoj, kiujn

ni disdonos al niaj geanoj, ĉar ni pensas, ke ilin povas interesi sciigoj detalaj pri tiu grava afero. Ni ĉerpas el la anoncoj ricevitaj la sekvantajn liniojn, kies legado sendube plaĉos al ĉiuj.

«*Parkurbo-Esperanto* kuŝos sur la dekstra bordo de rivero Wurm, en 5 kilometroj de la urblimo de München.

La nomo Parkurbo ĝi ricevis pro tio, ke ĉiuj domoj en ĝi estos tute apartigitaj unu de la alia per ĝardenoj kaj parkoj, kiuj tute ŝirmos ilin kontraŭ vento kaj polvo kaj donos agrablan ombron dum somera varmego...

Ĉiuj loĝontoj en nia urbo estos absolute egalrajtaj urbanoj kaj ne diferenciĝos unu de la alia per naciaj, religiaj, aŭ politikaj konvinkoj, sed ili ĉiuj devas esti esperantistoj, ĉar laŭ nia regularo ni povas vendi la domojn en nia urbo nur al esperantistoj, aŭ al amikoj de Esperantismo, t. e. al tiuj personoj, en kies familioj almenaŭ po unu ano devas ellerni Esperanton...

Ni, entreprenantoj, estas nun en tia feliĉa situacio, ke ni havas la eblecon subteni tiujn metiistojn, malgrandajn komercistojn kaj aliajn personojn, kiuj volus fondi iajn metiejojn, butikojn, hotelojn k-t. p., Ankaŭ personoj, kiuj deziras kaj kapablas esti komizoj, vendistoj, librotenistoj, k. t. p., povas trovi por si oficojn en la Parkurbo...

Sed ni ne havas rajton klopodi kaj zorgi nur pri fizika bonstato de nia urbo, — ni devas memori ankaŭ pri spiritaj postuloj de nia estonta loĝantaro, kaj por laŭforte plenumi tiujn naturajn postulojn, ni, kune kun la loĝdomoj, intencas ankaŭ konstrui preĝejon, teatron, kazinon, klubon, lernejon, monumenton de nia Majstro; ni intencas fondi internacian bibliotekon, eldonadi nian propran ĵurnalon k. t. p.»

ADRESARO DE «BARCELONA STELO», LA 1.an DE JULIO 1912

(*Daŭrigo*)

| | | | |
|---|---|---|---|
| 44 | Sro. D. Dalmau | strato | Angels, 1, entl., 1a |
| 45 | » E. Vidal | » | Sant Pau, 113, 4t - 2a |
| 46 | » F. Pujulà Vallès | » | Rbla. Catalunya, 89, 1r - 2a |
| 47 | Sino. G. Rebours de Pujulà | » | Rbla. Catalunya, 89, 1r - 2a |
| 48 | Sro. C. Bravo | » | Moles, 18, 3a |
| 49 | » J. Casanovas | » | Abaixadors, 9, 3r - 1a |
| 50 | » A. Torné | » | Maldonado, 21, tda. |
| 51 | » R. Casafont | » | Bruc, 9, magatzem. |
| 52 | » F. Portella | » | Borrell, 63, pral., 2.a |
| 53 | » J. B. Iduarte | » | Borrell, 5, 1r - 1a |
| 54 | Fino. D. Pérez | » | Cabanyes, 15, 3r - 1a |
| 55 | » C. Pérez | » | Cabanyes, 15, 3r - 1a |

(*Daŭrigota.*)